# KIEL DIRI TRIMANIERE

## (VIDEOLECIONOJ)

Celata publiko:
Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**



Ĝi estas la domo de Georgo.

Ĝi estas tre komforta.

Jen estas la loĝejo de Georgo.

Ĝi estas komfortega.

Vi vidas la domon de Georgo.

Ĝi havas multan komforton.

REZIDEJO ESTAS LOĜEJO PERMANENTA, KONSTANTA KAJ CIVILE OFICIALA.

DOMICILO ESTAS DEFINITIVA KAJ LAŬLEĜA REZIDEJO. ĜI *"estas la loko, kie oni havas sian hejmon, okupon aŭ ĉefajn aferojn; fiska domicilo" (PIV).*

LOĜEJO ESTAS LA LOKO, KIE ONI VIVAS PERMANENTE AŬ RESTAS PORTEMPE. *EN LA KONGRESO MULTAJ RESTAS EN LA KOMUNA LOĜEJO.*



Ĝi estas la loĝdomo de Rita.

Ŝi multe ŝatas ĝin.

Rita rezidas en tiu domo.

Ŝi ŝategas sian loĝejon.

Jen estas la domicilo de Rita.

Ĝi estas tre ŝatata de ŝi.



Ĝi estas la strato, kie situas la domo de Georgo.

Ĝi estas tre longa kaj estas plena de arboj.

Jen la strato, kie vivas Georgo.

Ĝi estas tre granda kaj arboplena.

Ĝi estas la strato de Georgo.

Ĝi tre longas kaj plenas je arboj.



Ĝi estas la strato, kie situas la domo de Rita.

La loĝejo de Rita estas en tiu strato.

Rita loĝas en tiu urba vojo.




MALLARĜA TROTUARO



LARĜA TROTUARO



Urba asfaltita vojo



Kampara tera vojo



Proksime de la strato de Georgo estas bela plaĝo.

Ne tre for de la urba vojo, kie vivas Georgo, estas bela strando.

Bela marbordo troviĝas proksime al la strato, kie li loĝas.



En la kvartalo de Rita estas klubejo kun naĝejo, kie ŝi faradas akvo-gimnastikon.

En la urboparto, kie vivas Rita, ekzistas sportklubejo, en kies naĝejo ŝi ofte akvo-gimnastikas.

La klubanino Rita ofte vizitas la klubon en sia kvartalo, por fari akvo-gimnastikon.



La kvartalo, kie Georgo loĝas, estas tre granda.

Georgo vivas en tre larĝampleksa kvartalo.

Nova Aŭroro, la urboparto loĝata de Georgo estas vastega.



PREĜEJO



SUPERBAZARO



BANKO

En la kvartalo, kie Georgo vivas, estas katolika preĝejo, granda superbazaro kaj banko.

En la kvartalo loĝata de Georgo estas katolikejo, superbazarego kaj financa institucio.

En la urboparto de Georgo estas preĝodomo, memserva butikego kaj bankoficejo.



La kvartalo, kie Rita loĝas, estas trankviliga, sen bruoj, sen konfliktoj kaj sen perfortoj.

Ŝia urboparto estas sereniga, sen malharmoniaj sonoj,
sen kvereloj
kaj sen violentoj.

Rita vivas en kvieta kvartalo, sen fortaj sonoj, sen sociaj problemoj kaj sen agresoj.











FRANDAĴOJ



FRANDAĴ-VENDEJO

En la kvartalo, kie Rita vivas, ekzistas luksa frandaĵ-vendejo, granda poŝtoficejo kaj multe vizitata gazet-budo.




*POŜTOFICEJO*

En Periperio, la urboparto de Rita, troviĝas komforta delikataĵejo, granda poŝtejo kaj tre vizitata revu-budo.



GAZET-BUDO

En ŝia kvartalo troveblas bele aranĝita butiko de delikataĵoj, larĝa oficejo de la poŝto kaj gazetejo, kie multaj klientoj aĉetadas.

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

